
# Azukio

*Anno demandas Janon pri azukio kaj Jano respondas*




Tio estas kio –
tiu *azukio*?
*Bona azukio* –
tio estas kia?
Sciu, kara Anno,
oni faras annon
dolĉan el ĝi, tian,
scias vi ... *ĉi tian!*

Notoj:

1. La Nova PIVo zorge distingas majusklan Annon kaj minusklan annon.
2. Neniam volu regali viajn gastojn je anno, se vi ne havas azukion.
3. Mi ne scias, kial Anno demandis ĝuste Janon.
4. Majusklo iam estas malpli granda ol granda minusklo, tamen tipa majusklo estas litero granda.
5. Pri dolĉa anno demandu Janon aŭ Annon.
6. Pri la legomo *azukio* konsultu s-ron Wouter Pilger en Nederlando aŭ en la vebo.
7. Anno estis mamnutranta bebon, do ŝi ne povis mem konsulti vebon.

Glosoj:




PIV - Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto
PIVo – tio supra
*Anno* – virina nomo en la Nova PIVo.
*azukio* - fabosimila kreskaĵo en Orienta Azio
*estas* - prezenca indikativo de la kopulo *esti*
*el* – ofta prepozicio en la aposteriora skemisma planlingvo iniciatita de Ludviko Lazaro Zamenhof en la jaro 1887.
*kia :* demanda tabelvorto adjektiva
*adjektivo* – (pli-malpli): *a*-vorto (vd. ĉe Bertilo en la vebo)
*bebo* – neologismo pri suĉinfano.
*vebo* - tuttera teksaĵo

# Demandoj kun eblaj respondoj

1. ***Kiel la malpli nova versio de Plena Ilustrita vortaro markis virinajn nomojn?***

   (Unu el la eblaj respondoj:)

   *Oni tie uzis la finaĵon-a, ofte en konkordo kun pli-malpli internacia uzo de iuj nomoj (Maria, Eva), sed ofte ankaŭ sen la subteno de tia tradicio (Edita, Elizabeta, Izisa, Venera).*

2. ***Ĉu Ludoviko Lazaro Zamenhof konsideris sin „la kreinto" de Esperanto?***

   (Ebla respondo:)

   *Ne. Li konsideris sin unu el la Esperantistoj, kiuj ja komune estas la posedantoj de Esperanto. Li la lingvon nur iniciatis, kaj antaŭvidis ĝian longan evoluon. Oni parolas pri Ludoviko Lazaro Zamenhof kiel pri la iniciatinto de Esperanto. La unua generacio de la esperantistoj volonte honoris lin ankaŭ per la alparolo **Majstro**.*